Tiu interkonsento estas farita laŭ par. 14 de la Statuto.

## DENASKA ESPERANTISTARO

Dum la ses militaj jaroj nia asocio preskaŭ stagnis. Ni ricevis nur 21 novajn anojn: el Anglujo 13; Skotlando 3; Argentino 2; Nederlando 1; Aŭstralio 1; Usono 1; tamen dum la postaj ok monatoj (kvankam la poŝtaj aranĝoj ne plene funkciis) aniĝis el Francujo 6; Usono 4; Maroko 3; Argentino 2; Irlando 1; Skotlando 2; Anglujo 1; Islando 1; Italujo 2; entute 22. Sendube Esperantujo estas bonakceptanta nian proponon!

La plena celo de D.E. estas kreiĝi novajn generaciojn de laŭnaturaj Esperantistoj jam de naskiĝo, kiuj eniros la mondon, *kiel vivantaj propaganditoj*. Ni nun havas anojn en 12 landoj, post nur jaro kaj duono de efektiva funkciado.

Ni celas instigi gepatrojn, ke kiel eble plej frue post la naskiĝo, ili dediĉu la infan(in)on al nia movado, kaj

eduku ĝin tiel, ke ĝi estu *dulingvano* en la hejmo de ĝia atingado de lingvokapableco. Por helpi al la infano kaj al la gepatroj, D.E. nomas (eble je rekomendo de la gepatroj) lokan Esperantist(in)on por rilati kun la infano kiel *Onkl(in)o*,—kvazaŭ baptopatr(in)e—kaj ĝin kuraĝigi.

Ĝi tiel edukiĝu en la hejmo, ke ĝi fariĝu modeste fiera pri lingvo, kiu estas parolata de noblanimaj kaj kleraj homoj tra la tuta mondo. Enirante lernejan vivon, la infano *semos la ĝermon* inter siaj gekunuloj kaj geinstruistoj.

Ni publikigados de tempo al tempo *Bultenon* por informi la gepatrojn kaj amuzi la gefilojn; ni penos kiel eble plej efike interkonatigi niajn anojn; laŭ niaj enspezoj ni publikigos libretojn utilajn por infanoj; kaj ni tutkore asociiĝos kun aliaj entreprenoj simile celantaj, por reciproka helpo.

**Kotizoj.** Por ke neniu estu malhelpata de la kosto, ni fiksas minimumajn kotizojn (kaj ni bonvenigos ĉiujn) sed kiu pagas nur tian, tiu efektive ŝargas nian malgrandan kason, nur por necesaj poŝtaĵoj. Do, kotizu, ni petas, laŭ via bonkoro, eble du-tri jarojn kune. Por infano ĝis lernejaĝo, pagu minimume  $\frac{1}{2}$  svisan frankon, aŭ ses pencojn anglajn. Por pli aĝaj kaj Helpmembroj, pagu minimume 1 svisan frankon, aŭ 1 ŝilingon anglan. (Pageblaj senpere aŭ per respondkuponoj aŭ propralande neuzitaj poŝtmarkoj, precipe memorigaj; aŭ pere de la Ĉefdelegito aŭ Peranto de IEL, al la konto de D.E. ĉe IEL.

**Geonkloj** el ĉie en la mondo estas bonvenigataj. Skribu poŝtkarte por informo. Prezidanto: S-ro Robert Robertson, F.B.E.A., 228 Alexandra Park Road, London, N.22, Anglujo, kiu korespondas pri demandoj kaj oficialaj aferoj. Sekretariino: S-ino G. P. Weston, 27 Cecil Road, London, N.10, kiu kondukas la funkciadon de la asocio.

## SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

(Fondita en 1918)

### CELOJ

- 1.—Disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto.
- 2.—Disvastigi Esperanton inter ĉiulandaj skoltoj.
- 3.—Krei *skoltan* literaturon en Esperanto.
- 4.—Eldoni internacian skoltan gazeton aŭ revuon.
- 5.—Solidarigi la senton de frateco, komunan ĉe la du movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

*Prezidanto* : S-ro Norman Booth, komisar.  
*Hon. Gen. Sek.* : S-ro F. N. Blythe, eks-trupestro, 103  
 Leopold Road, Ipswich, Anglujo.  
*Hon. Kasisto* : S-ro D. H. Davis, eks-trupestro, 23 East  
 Dulwich Grove, London, S.E.22, Anglujo.  
*Kuratoroj de la Kapitalo* : S-roj P. Blaise kaj D. H. Davis.  
*Oficiala organo* : *Skolta Bulleno*.  
*Kotizoj* : geskoltoj pli ol 18jaraj .. .. 2ŝil.  
 ,, malpli ol 18jaraj .. .. 1ŝil. 6p.  
 aliaj .. .. 3ŝil.

## TUTMONDA ASOCIO DE ĜEINSTRUISTOJ ESPERANTISTAJ

(Fondita en 1924)  
 Portempe ne funkcias.

## TUTMONDA ESPERANTISTA KURACISTA ASOCIO

(Fondita en 1908)  
*Celo* : Kunigi Esperantistajn kuracistojn, farmaciistojn,  
 kaj samfakanojn, kaj helpi al ilia interrilato.  
*Adreso* : D-ro P. Kempeneers, 19 avenue Montjoie,  
 Uccle 3, Belgujo.  
*Gazeto* : Internacia Medicina Revuo (nuntempe ne estas  
 publikigata).

## KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

(Fondita en 1921)

*Celo* : Interesi Kvakerojn pri Esperanto, kaj antaŭenigi  
 Mondpacon per la Lingvo Internacia.  
*Membraro* : Aĝoj de la Religia Societo de Amikoj  
 (Kvakeroj), kaj Kunadorantoj.  
*Oficistoj* :  
*Prezidanto* : D-ro Edmond Privat.  
*Vic-Prezidantoj* : M. C. Butler, R. H. Crowley, John A.  
 Gill, M. C. Gillett, F. W. Hipsley, Jean Inebnit,  
 Marie Butts, Ethel M. Priestman, Florence D.  
 Priestman, Kurt H. Schmidt, Henry Van Eften,  
 Fred J. Williams, Carl E. Svenning, Lee D. Stern,  
 Fred J. Tritton.

*Kasisto* : Ralph H. Crowley, Sewell's Orchard, Tewin,  
 Welwyn, Herts., Anglujo.  
*Sekretario* : James T. Harrod, Green Maze, Godalming,  
 Surrey, Anglujo.  
*Help-sekretario* : Brian Bone.

## AMERIKA ESPERANTISTO

Dumonata revuo de Nord-Ameriko

**AE** enhavas artikolojn, angle kaj esperante, de eminentaj Esperantistoj el diversaj partoj de la mondo—pri Esperanto-movado, lingvistiko, literaturo, k.t.p. *La Brita Esperantisto* recenzis jene : "En ĉiu numero aperas artikoloj seriozaj kaj informaj, kaj ĝi estas unu el la plej vivaj gazetoj en nia movado."

**AE** estas lukse presita, kaj ĝi spegulas la plej kleran kaj spertan pensadon pri Esperanto en Nord-Ameriko kaj la mondo.

**AE** jarabono kostas \$1.50 usona. El landoj kie estas neeble sendi monon, "AE" akceptas bonajn Esperanto-librojn kiel pagon laŭvalore. Specimena ekzemplero : 4 respondkuponoj.

*Redakcio kaj Administracio* :

Amerika Esperantisto, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y., Usono

## MARTINUS

Per logikaj analizoj, bazitaj je niaj propraj spertoj, Martinus montras al ni la celon de la vivo, la planon de la universo, la fondon por vera homa interrilato, por eterna paco.

*Senpaga informilo havebla ĉe*

**LIVETS BOG'S BUREAU**  
 Mariendalsvej, København F., Danujo

## LA ESPERANTISTA GAZETARO

Sube ni donas liston de ĉiuj gazetoj Esperantaj nun aperantaj, pri kiuj ni havas definitivan informon. Tiujn kun steleto \* antaŭ la nomo oni povas mendi ĉe I.E.L., sed nur tiujn.

- \***Amerika Esperantisto.** 114 West 16 Street, New York 11, N.Y., Usono. Dumonate; \$ 1.50 jare. (7/6).
- Arbetar Esperantisten.** Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo. Monate; 3 kr.
- Argentina Esperantisto.** Castelli 265, Buenos Aires, Argentino. Kvaronjare; 2 sv. fr.
- Belga Esperantisto.** 44 Avenue de Brujn, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.
- O Brasil Esperantista.** Praca da República 54, Rio de Janeiro, Brazilo. Kvaronjare; 15 respondkuponoj.
- \***British Esperantist, The.** 140 Holland Park Ave., London, W.11, Anglujo. Dumonate; 3 ŝil.
- Comprendre.** 1 quai Claude Bernard, Lyon, Francujo. Kvaronjare.
- Dansk Esperanto-Blad.** Aalokkehaven 24, Odense, Danujo. Monate; 3 kr.
- Esperantista Bahiano.** Rua do Bangala 18, Salvador, Bahia, Brazilo. Kvaronjare.
- Esperanto Internacia.** Esperanto House, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Monate; 7 ŝil. 6p.
- Esperanto.** Palais Wilson, Genève, Svisujo. Dumonate; 10 sv. fr.
- Esperanto-Airut.** Seinäjoki, Finnlando. Dumonate; 80 fmk.
- Esperantobladet.** Boks 942, Oslo, Norvegujo. Monate.
- Espero Katolika.** Roelofarendsveen, Nederlando. Monate; 3 guld.
- Familia Rondo, La.** F-ino H. Mayne, Woodbine Cottage, Tarlton, Cirencester, Glos., Anglujo. Kvaronjare; 2 ŝil.
- Flandra Esperantisto.** Pieter van Humbeckstr. 3, Brussel-West, Belgujo. Monate; 75 fr.b.
- Flandra Katoliko.** J. Merks, Goedendaglaan 109, Kortrijk, Belgujo. Monate; 60 fr.b.
- Franca Esperantisto.** 34 rue de Chabrol, Paris 10, Francujo. Monate.
- Global Thinking.** 4321 Fourth Avenue, Detroit 1, Michigan, Usono. Dumonate; \$2.00 jare.
- Helena Esperantisto.** Str. Rodou 23, Athenai 8, Grekujo. Kvaronjare; \$2.
- Interna Bulteno.** Palestina Esperanto-Ligo, P.O.B. 320, Jerusalem, Palestine. Duonjare.

- \***Internacia Kulturo.** Str. Graf Ignatiev 2, Sofia, Bulgarujo. 10-foje jare. 7ŝ. 6p.
- Irlando Vokas.** Sonas, Cnoc na hInneona, Dundroma-Dublin, Irlando. Monate; 10 rpk.
- Kompreni.** 32 Cours Gambetta, Lyon VII, Francujo. Monate; 10 rpk.
- Laborista Esperantisto.** Vier Heemskinderenstr. 53-II, Amsterdam-W., Nederlando. Monate.
- La Eta Heroldeto.** 2 Cambridge St., Willoughby, N.S.W., Aŭstralio. Dumonate.
- La Juna Vivo.** T. J.O., Westgraftdijk (N.H.), Nederlando. Monate; 1.50 guld.
- La Kosmopolito.** Oficiala organo de S.A.T., 67 Avenue Gambetta, Paris 20, Francujo. Monate.
- La Progresanto.** Postbus 8002, Amsterdam-W., Nederlando. Monate, fl. 1.75.
- La Rondo.** F. R. Banham, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Vic., Aŭstralio. Monate; 6 ŝil.
- \***La Verda Flamo.** 5 Rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko. Monate; 6 ŝil.
- \***Malgranda Revuo.** Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Kvaronjare; 4 kr. (4/4).
- Monda Bonvol-Servo.** 16 Dominion Boulevard, Windsor, Ontario, Kanado. Duonmonate; 10 rpk.
- \***Monda Revuo** ilustrita, Postkesto 30, Randers, Danujo. Monate, 7ŝ. 6p. aŭ 18 rpk.
- Nederlanda Esperantisto.** Stadionkade 6, Amsterdam-Z., Nederlando. Monate.
- Official Bulletin.** 6 Clifford Street, Karori, Wellington, Nov-Zelando. Monate, por membroj de N.Z.E.A.
- Paco kaj Justeco.** Nieuwstraat 54, Assebroek, Belgujo. 25 fr.b.
- Per Unu Voĉo.** Laborista Esperanto-Kunularo, Poŝtkesto 7356, Johannesburg, Sud-Afriko. Monate; 3 ŝil.
- Renovigo.** Jesus Amaya, Dir. Ap. 59, Mejiko, Meksiko. Monate.
- Sudhungarlanda Stelo.** "Dürer" nyomda, Gyula, Hungarujo. Monate.
- Svenska Esperanto-Tidningen.** Fack 19071, Stockholm 19, Svedujo. Monate; 4 kr.
- Svisa Espero.** Neuveville (Berne), Svisujo. Dumonate; 10 rpk.
- Vojo-Vero-Vivo.** Fraterhuis, Loonopzand (N.Br.), Nederlando. Dumonate; senpage por nekatolikoj.

Notu : rpk = internacia respondkupono.



# ESPERANTO INTERNACIA

estas la oficiala organo de I.E.L.

Se vi volas esti bone informata  
pri la stato de la Esperanta  
movado tra la mondo ;

Se vi deziras legi interesajn  
artikolojn ;

## ABONU ĜIN

Tion vi povas plej oportune  
fari per aliĝo kiel Membro-  
Abonanto.

## LANDAJ RAPORTOJ

*En la aŭtuno 1945 ni estis tiel superŝutilaj de laboro, ke ni ne sukcesis dissendi petojn pri la kulimaj landaj raportoj. Sekve malmultaj aŭvenis, sed en estontaj jaroj ni esperas presigi raportojn el preskaŭ ĉiuj landoj.*

### AŬSTRALIO

La jaro 1945 vidis la militfinon en la Pacifika mondparto, kvankam multo restas farenda antaŭ ol oni povas diri, ke ni ĝuas tutan pacon.

Samideanoj en Aŭstralio salutas la liberigitajn landojn esperante, ke daŭraj trankvilaj jaroj donos al ni ĉiuj instigon al vigla propagando por Esperanto. Aŭstralianoj bonvenigas la restarigon de poŝta kontakto inter landoj longe disigitaj.

Dum la militaj jaroj nia Nacia Asocio vigligis kun la aparta celo certigi la vivon de la movado ĉi tie en la mallumaj tagoj. Por certigi, ke neniu forgesu tiun celon, la Estraro elektis kiel Asocian devizon, *Ni gardu la sanktan flamon.*

Vigle klopodis nia Ĉefdelegito S-ro L. E. Pfahl, kiu raportis, ke antaŭ la jarfino ni havis 32 Delegitojn kaj Fakdelegitojn. Espereble la cifero rapide kreskos ĝis reprezentanto de IEL sin trovas en ĉiu grava urbo de la lando.

En 1945 nia membraro daŭre klopodis sur la propaganda kampo. En Queensland niaj ĉefpropagandistoj, S-roj Littleton kaj Wanmer, okazigis publikajn prelegojn dum kiuj ili ne maltrafis okazon mencii la lingvoproblemon. Radia diskuto el Brisbane altiris leterojn el ĉiuj ŝtatoj. En Victoria S-ino Hanks denove paroladis el la nacia radiostacio, kiel ankaŭ S-ro A. Turner en Shepparton el stacio 3SR. En Perth (W. Aŭstralio), radiostacio 6WN prezentis paroladon de nia vigla samideano F-ino Stremple. D-ro Caldera de la Okcident-Aŭstralio Ligo raportis, ke la tieaj samideanoj persvadis la Edukajn Aŭtoritatojn starigi kurson en Perth Teknika Lernejo. La doktoro ankaŭ starigis kurson en kiu partoprenis kelkaj policistoj. S-ro P. Schwerin (Sydney) raportis, ke li faris arangojn donaci Esperantajn librojn al la ĉefaj publikaj bibliotekoj.

Nia oficiala organo *La Rondo* daŭre aperis monate sub la gvido de S-ro F. R. Banham (Melbourne) kaj F-inoj L. E. Bailey kaj W. Addis (Adelaide). Limigita kvanto estas

haveblaj al transmaraj samideanoj je prezo 6 ŝil. ĉiujare. Abonojn oni sendu al la Asocio Kasistino F-ino W. Addis, 25 Greville Avenue, Flinders Pack, Adelaide, S. Aŭstralio.

La Korespondaj Kursoj sub gvido de S-ro F. Pitt estis sukcesaj, kaj Pastro C. C. Cowling (Tasmanio) daŭre aranĝas kaj estras la ekzamenojn.

Finance la rezulto de la jaragado estis kontentiga kaj ni antaŭen rigardas al sukcesa jaro venonta.

G. HILLERMAN, *Sek. de A.E.A.*

## BRITUJO

Kiel en 1944, la movado en Britujo progresis dum 1945 trankvile sed ĝenerale kontentige. La Brita Esperantista Asocio (kiu en julio reokupis sian propran domon en Londono) enspezis pli ol en 1944 pri kotizoj kaj libroventa profito; el la kotizado ĝi transpagis al IEL £652, kontraŭ £547 en la antaŭa jaro. Pli ol 1400 novaj lernantoj registriĝis por la elementa koresponda kurso de la Asocio; kaj la pli altaj kursoj estis bone subtenataj. La Sekretario de la Asocio, S-ro R. B. Wilkinson, liberiĝis el la Aerarmeo (en kiu li deĵoris dum 5 jaroj) kaj reprenis sian oficon en oktobro. La Eduka Sekretario (S-ro M. C. Butler) daŭrigis grandskalan propagandon en diversaj lernejoj: kaj multe da laboro en edukaj rondoj faris la memstara Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj.

La britaj Esperantistoj arde rigardas antaŭen al konstante pliiĝantaj rilatoj kun aliaj landoj kaj al la espreble ne tre malproksima okazigo de Universala Kongreso!

B.E.L.

Io nova en ĵurnalismo

## MONDA BONVOL-SERVO

Aventuro en monda ĵurnalismo; unu voĉo aŭdita en 50 landoj; duonmonata novaj-dissendo

10 respondkuponoj jare

MONDA BONVOL-ELDONEJO

16 Dominion Boulevard, Windsor, Ontario, Kanado

## BULGARUJO

La Bulgaran Esperanto-movadon ĉiam partoprenis grandega nombro da homoj, kiuj bone komprenis la grandan utilon de la internacia lingvo por la kreo kaj plifortigo de la solidareco inter la demokratiaj popoloj. Tamen dum la milito nia movado, simile al ĉiuj aliaj demokratiaj kaj kontraŭfaŝistaj movadoj en la lando, estis preskaŭ sufokita de la faŝista diktatorregimo. La Esperanto-organizaĵoj ekzistis nur surpapere, la ŝtataŭtoritatoj ne permesis malfermon de kursoj. Krome pro manko de ebleco korespondi kun alilando, niaj lingvoj kaj movado ne povis akiri novajn posteulojn.

Kiam la plej akra faŝista diktatoreco ekregis kaj la arbaroj ekpleniĝis de popolaj ribelantoj, la Esperanto-organizaĵoj plene likvidiĝis. Tiam ankaŭ multaj bulgaraj Esperantistoj eniris en la partizanajn taĉmentojn por batali kun armilo en la mano kontraŭ la barbara reĝimo de la faŝistaj agentoj en Bulgarujo. En ĉi tiu batalo pereis multaj bonegaj samideanoj, kies manko nun estas ege sentata de la Bulgara Esperanto-movado.

Post la 9a de Septembro 1944, kiam kun la helpo de la ruĝa armeo la partizanaj taĉmentoj renversis la faŝistan reĝimon, por la Esperanto-movado malkovriĝis brilaj perspektivoj. La nova popoldemokratia registaro garantias plenan liberecon por la disvolviĝo de nia movado. Nur kelkajn semajnojn post la liberiĝo, preskaŭ ĉiuj societoj jam estis restarigitaj, kaj eĉ komenciĝis la fondado de novaj societoj. En multaj lokoj funkciis kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Pri la nombro de la kursanoj, oni povas ricevi ian ideon, konsiderante la kvanton de la lastatempaj eldonitaj lernolibroj por komencantoj. Tri aŭtoroj reeldonis siajn lernolibrojn kun tuta eldoncifero de 20,000 ekzempleroj, el kiuj pli ol duono jam estas vendita.

En la kongreso, kiu okazis en Sofio 3-4 Septembro 1945, estis proksimume 150 delegitoj el ĉiuj partoj de la lando, kaj pli ol 400 gastoj. La delegitoj reprezentis proks. 40 lokajn organizaĵojn kun pli ol 1000 pagintaj membroj! La kongreso faris gravajn decidojn, precipe rilate la organizon de amasa internacia korespondado, pri la stabiligo kaj plifortigado de la organizaĵoj, pri fondo de Esperantista Eldona Kooperativo, k.a.

Oni devas konfesi, ke ĝis antaŭ nelonga tempo, la movado estis serioze malhelpata de la malfacileco rilate la

poŝtajn rilatojn. La klopodoj kontakti la alilandon restis dum longa tempo vanaj. Sed lastatempe la korespondado vigliĝis. Multaj samideanoj jam kontaktis siajn malnovajn korespondantojn kaj en la redakcion de *Internacia Kulturo* venas ĉiutage multaj leteroj de diverslandaj korespondemuloj. Estas certe, ke post nelonga tempo disvolviĝos grandskala amasa internacia korespondado, kiu donos al la Bulgara Esperanto-movado eblecon penetri en pli vastajn mediojn kaj helpi al la kreo de fortaj amikaj rilatoj inter nia popolo kaj ĉiuj aliaj demokratiaj liberamaj popoloj.

VITALI JULZARI, *Sekretario de B.E.A.*

### FIGIO

Dum 1945 D-ro F. J. Williams en Suva daŭrigis la propagandon en diversaj lokoj en Figio, sed nun transloĝiĝis al Nov-Zelando post vizito al Aŭstralio. S-ro F. H. Miles kaj li estris malgrandan klason en Suva.

S-ro C. G. O. Parr daŭrigas la laboron en Levuka kaj ankaŭ en Savusavu, Vanua Levu.

F. J. WILLIAMS.

Eltrovado kaj studado de

## KANCERO

laŭ la radiesteza metodo Stefano NEGREL

Skribu al Doktoro MICHEL (Servo H.B.)  
249 strato Paradis, Marseille, Francujo

### SINTONIZADO de MEDIKAMENTAJ KRESKAĴOJ

per radiesteza metodo

*Petu senpagan prospekton ĉe*

S-ro ETIENNE NEGREL  
249 strato Paradis, Marseille, Francujo

### FINNLANDO

La movado en Finnlando preskaŭ nur vegetis dum la lastaj 15 jaroj, ĉar la ĝenerala politika atmosfero estis al Esperanto malfavora. Tial ni nun preskaŭ tute malhavas junan sangon inter niaj vicoj; ankaŭ mankas instruistoj.

Post la milito iom post iom pli viglaj vivsignoj aperas. Kelkaj grupoj reviviĝas en diversaj lokoj, ekz. en Helsinki, Turku, Vaasa k.t.p. Kelkaj kursoj por komencantoj ankaŭ ekzistas. Ekzemple en Somero gvidas kurson en la geknaba gimnazio la ĉefdelegito. Partoprenas 20 gelnantoj 11-20-jaraj kaj 4 instruistoj.

Pasintan someron la Esperanto-Instituto de Finnlando ekfunkciigis libertempajn kursojn en Pankaharju, kiujn partoprenis ĉ. 100 samideanoj, inter ili 9 Skandinavoj. Kursestro estis S-ro Vilho Setälä kaj aliaj prelegistoj, S-roj K. Jokinen, H. Salokannel kaj T. Morariu el Svedujo. El tiu sukcesplena kursosemajno en la naturbela loko la ĉeestantoj kunportis neforgeseblajn memoraĵojn.

Tio kuraĝigis nin aranĝi ankaŭ somere 1946 similajn kursojn en Pankaharju, kiu aparte de sia nekompareble belega naturo, ĉiurilate estas taŭga loko por tio. Ni nun instigas kiel eble plej multajn samideanojn kaj Esperanto-amikojn partopreni la novajn kursojn, kiuj okazos de la 1a ĝis la 10a de julio. Dezirinde ankaŭ estus se tre multaj eksterlandanoj venus tien por libertempi kaj ĝui la Zamenhofan spiriton kun finnaj samideanoj. Bonvenon! Informon donos Esperanto-Instituto, Töölöntullink 7 A 2, Helsinki.

JOEL VILKKI.

### POR GRAVA ESPERANTO-EKSPOZICIO

deziras ĉiusepacajn Esperantajn prospektojn,  
presaĵojn, kartojn kun Esperanta teksto,

A. ST. LO MELLICHAMP, 808 Hamilton Blvd.,  
PEORIA, Ill., Usono

## HISPANUJO

La dummilitaj malfacilaĵoj kaŭzis en Hispanujo gravan malkreskon de la Esperanto-movado, kiu preskaŭ mortis. La neebleco de internacia korespondado kaŭzita de la militaj baroj, la neebleco sendi monon eksterlanden kaj pagi kotizojn kaj abonojn ktp., malfavoris altgrade nian aferon. Tamen en la koroj de la samideanaro la flamo de la verda ideo ĉiam ardis, kaj ĉiuj senpacience atendis la feliĉan horon de la paco.

Fine post sesjara militado, la mondo repaciĝis kaj la hispanaj Esperantistoj pretiĝas por vigla propaganda laboro favore al nia helplingvo. Malnovaj samideanoj interrilatiĝas; oni projektas planojn kaj programojn. Kelkajn kursojn oni starigis kaj nun oni preparas starigon de Landa Asocio. Se ĉiu samideano plenumas sian devon, kaj tion oni rajtas esperi, multaj gravaj projektoj efektiviĝos.

La demando pri lingvo internacia altiras en Hispanujo ĉies atenton. Grava intereso, ĝis nun ne konata, vekigi inter la Hispanoj. La tero bezonas plugadon, sed ĝi malavare repagos la penadon. Se ĉiu Esperantisto senlace propagandas nian ideon, interesas iun pri nia afero, aliĝas la Ligon kaj la estontan Landan Asociacion, Hispanujo post nelonge reprenos sian lokon inter la plej gravaj landoj Esperantistaj.

F. RIVELLES GIMÉNEZ

## NOV-ZELANDO

Kun la alveno de la paco, la samideanoj en Nov-Zelando sin turnis al la estonteco kun fido kaj espero, preta daŭrigi la klopodadon por antaŭenigi la Esperanto-movadon. Malgraŭ la malfacilaĵoj, kiujn starigis la milito, niaj penoj neniam haltis dum tiu periodo de armita konflikto. Ni daŭre semis, atendante la tagon, kiam revenos la normala vivado kaj internacia paco. Tiu tempo jam alvenis. Kun renovigita forto ni faros nian eblon enkonduki spiriton de frateco inter la popolojn, helpe de nia simpla internacia lingvo. Nia landa organizaĵo—Nov-Zelanda Esperanto-Asocio—energie laboris dum la jaro. La Sekretariino (F-ino Joyce Wilson) estis nelacigebla. La financa situacio estas kontentiga. La oficiala organo—*Official Bulletin*—aperis ĉiumonate, danke al la malavaro kaj bonvolo de amikaj presistoj. Tiun kvarpaĝan gazeton la membroj ricevas senpage.

Dum la jaro la morto rabis de ni la jenajn samideanojn: S-ino A. Chapman-Taylor, S-roj J. W. Patterson kaj O. R. Harding. Tra la lando la kluboj regule kunvenas. Sekve de parolado propaganda farita de S-ro B. Potts, la Prezidanto de la landa asocio, nova klubo estis starigita en Khandallah. En Timaru kurso funkcias sub gvido de S-ro S. G. Hoskins. Brita Esperanto-Asocio elektis du novajn ekzamenistojn S-rojn L. E. Dust (Wellington) kaj A. E. Watkin (Wanganui).

La komitato de la Asocio decidis ne okazigi kongreson ĝis transport-rimedoj oporuniĝos por ebligi malproksimajn samideanojn partopreni. Eble, do, en 1946 kondiĉoj estos pli normalaj.

En la ĉiujara Konferenco de la Nov-Zelanda Laborista Partio, kiu okazis en Novembro 1945, oni unuanime kaj sendiskute akceptis rezolucion, ke Esperanto estu instruata en ŝtataj lernejoj. Antaŭ pli ol dek jaroj la Laborista Partio gajnis la plimulton en la parlamento kaj ankoraŭ estas la registaro, sed ĝis nun oni ne enkondukis la aferon en la lernejojn, ĉar la *lernejprogramoj ankoraŭ estas tro ŝarĝitaj!*

La libroservo de la Asocio daŭre funkcias, ludante gravan rolon por niaj membroj kaj samideanoj ĝenerale. Nia movado, do, ne dormas en malproksima Nov-Zelando, sed daŭrigas la viglan laboron por efektiviĝi la esperojn de D-ro Zamenhof.

B. POTTS.

## SUDAFRIKO

Kiam mi venis al Kapurbo mi trovis tie nur du Esperantistojn. Kune kun du aliaj poste trovitaj, en 1943 ni fondis grupon kun nomo *Bona Espero*. Tuj komenciĝis kursoj. La nombro de membroj, kiuj pagis kotizojn por 1945 estas 50. Laboro por Esperanto estas ĉi tie aparte malfacila pro tio, ke en la lando jam ekzistas du oficialaj lingvoj, kiuj konkuras unu kontraŭ la alia. Tamen evidentiĝas progreso kaj ni daŭrigos nian laboron, espereble kun pli da sukceso en la estonteco.

S. LIEBECK.

# ROBERT GRANT & SON

LIMITED



ESPERANTAJ LIBROJ

LIBROJ PRI SKOTLANDO

<sup>A</sup>GENERALA LITERATURO

EN DIVERSAJ LINGVOJ



126, PRINCES STREET  
EDINBURGH, SKOTLANDO

## USONO

La internaciaj konferencoj de Dumbarton Oaks kaj San Francisco kreskigis en Usono la komprenon pri la lingva problemoj kaj la intereson pri Esperanto. Prezidanto Truman diris en intervjuo en oktobro 1945: "Unu el la ĉefaj baroj al internacia amikeco kaj kunlaboro estas la lingva malsameco. Ju pli granda estas la malsameco inter du lingvoj, des pli granda estas la malhelpo. La vario de la signifo de vortoj estigas konfuzon. Estas malfacile interparoli pere de interpretistoj, ĉar eĉ se la tradukoj estas laŭvortaj, tamen la intencataj signifoj povas esti distordataj." Per tiuj vortoj la Prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj esprimas fakton, kiun multaj el liaj samnacionoj komencis serioze pripensi en 1945.

Kvankam la teknikaj aranĝoj de la Konferenco de San Francisco ne favoris agadon de privataj organizaĵoj, F-ino Helene Wolff-Kleve, Speciala Reprezentanto de EANA kaj Deleĝitino de IEL, sukcese laboris, disdonante ekzemplerojn de *Amerika Esperantisto* kaj alian Esperanto-materialon, organizante specialan kunvenon, metante anoncojn pri Esperanto en la ĵurnalojn de San Francisco k.t.p. Multaj ĵurnaloj en ĉiuj partoj de Usono publikigis, okaze de la Konferenco de San Francisco, leterojn, kiuj atentigis pri Esperanto. La plej sukcesa el la leter-skribantoj estis S-ro Decevare King el Massachusetts. Numero de la gazeto *Vital Speeches* (Gravaj Paroladoj) aperinta ĵus antaŭ la Konferenco de San Francisco, enhavis artikolon pri Esperanto de D-ro W. Solzbacher, sub titolo *Komuna Lingvo por Mondorganizo*.

Esperanto ankaŭ faris gravajn progresojn en la rondoj de lingvo-instruistoj kaj profesoroj de lingvo-scienca. Demonstracia Konferenco pri lingvo-instruado, okazinta en New York la 5an de Majo 1945, enhavis sekciojn pri franca, germana, itala, portugala, hispana, ĉina, hebrea kaj juda lingvoj kaj pri Esperanto. La Esperanto-demonstracio farita, laŭ la Cseh-metodo, de S-ino Doris Tappan Connor, estis unu el la plej sukcesaj kaj plej bone vizitataj partoj de la Konferenco. La presita programo de la tuta konferenco surhavis la devizon: *Ni inter popoloj la murojn detruos—D-ro Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto*.

Grava libro de Profesoro Mario A. Pei, de Columbia-Universitato en New York, pri lingvoj de la mondo (*Languages for War and Peace—Lingvoj por Milito kaj*

Paco) elvenis en 1945 en dua eldono enhavante kompletan Esperanto-gramatikon kaj frazaron sur paĝoj 580-608. La Esperanta parto estas verkita de G. Alan Connor, Generala Sekretario de EANA kaj Redaktisto de *Amerika Esperantisto*, kaj lia edzino Doris Tappan Connor. Ĝi ankaŭ aperis kiel aparta volumeto en la *Mondlingva Serio* de Profesoro Pei. En la lingvoklasoj de Profesoro Pei en Columbia-Universitato demonstracioj pri Esperanto okazas regule. Alia pli malgranda libro, *10-en-1 Vortaro de Baza Lingvokono en Franca, Germana, Hispana, Itala, Rusa, Ĉina, Japana, Araba, Portugala kaj Esperanta lingvoj* de Marcel Rodd, el Hollywood, ankaŭ aperis en 1945. La Esperanto-parton (sur paĝoj 99-110) verkis Ges-oj Connor. Oni presis 50,000 ekzemplerojn de la libro kaj jam vendis la pli grandan parton.

Ankaŭ en radio Esperanto faris progreson. S-ro Stanley A. Klukowski gvidis ĉiusemajnan Esperanto-programon kaj kurson en Stacio WRJN en Racine, Wisconsin. En New York serio de 10 duonhoraj Esperanto-programoj en sinsekvaj semajnoj okazis en FM (Frekvenc-Modula) Stacio WABF. Ges-roj Connor gvidis ilin kun okaza helpo de S-ino Pauline Knight kaj aliaj. Grupo da gestudentoj ariĝis kun ili ĉirkaŭ la mikrofono. Estis la unua fojo, ke la Cseh-metodo estis adaptita al radio-instruado, kaj ankaŭ—laŭ nia scio—la unua fojo, ke Esperanto utiligis la supermodernan eltrovon de FM-Radio. La programoj konsistas el paroladoj, diskutoj, intervjuoj kaj kurso, kaj estis laŭ la juĝo de fakuloj, tre altkvalitaj. La radio-stacio intencas ripeti la interesan eksperimenton.

En diversaj radio-stacioj oni intervjuis F-inon Roan Orloff el Boston pri Esperanto. En stacio WBYN, Brooklyn, D-ro W. Solzbacher paroladis hispanlingve pri Esperanto. Diversaj tutusonaj radio-programoj menciis Esperanton simpatie, ekz. *The Answer Man* (La respondanto), *Home Is What You Make It* (Vi mem faras vian hejmon), Dale Carnegie (serioza) kaj Arthur Godfrey (bonhumora).

La Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko (EANA) ne povis organizi kongreson en 1945 pro la vojaĝmalfacilaĵoj kaj pro la deziro de la Registaro, ke ĉiuj kongresoj ne absolute necesaj por la milito aŭ ekonomia bonfarto estu prokrastataj. Oni do elektis novajn Komitatojn kaj Estraron per koresponda voĉdono, kun la jena rezulto: D-ro Cecil Stockard, Bradenton, Florida—Prezidanto;

S-ro Robert Karlson, Montreal, Kanado—VicPrezidanto; S-ro George Alan Connor, New York—Generala Sekretario; S-ro E. A. Knight, New York—Kasisto; S-ino Doris Tappan Connor, New York—Vic-Sekretariino; S-ro Joseph Leahy, Washington—Estrarano.

La dulingva gazeto *Amerika Esperantisto* aperis regule kaj estis sendube en 1945 la plej granda el ĉiuj Esperanto-gazetoj en la mondo. Leteroj ricevitaj el multaj landoj diris, ke ĝi ankaŭ estas unu el la plej bonaj kaj interesaj. En 1945 oni dissendis pli ol 1500 ekzemplerojn propagandecajn al membroj de la Registaro, de la Senato kaj Domo de Rezentantoj, al fakuloj pri internaciaj aferoj kaj estroj de gravaj organizaĵoj, al profesoroj de lingvoscienco, estroj de junularaj kaj skoltaj asocioj k. t. p. *Amerika Esperantisto* trovigas en pli ol 100 universitataj kaj publikaj librejoj kaj estas acetebla en kelkaj libro-kaj jurnal-vendejoj.

Kun la fino de la milito kaj la reveno de multaj Esperantistoj el la armeo kaj maristaro oni rajtas antaŭvidi gravajn progresojn kaj sukcesojn en 1946.

E A N A

## LA MONATA ĴURNALO

# SUNSPORTO

(“Mod Solen”)

en dana lingvo kun tre multaj fotoj, kiuj rakontas pri la vivo de “sunportuloj” en Danlando kaj aliaj landoj. La nuda homa korpo sub la influo de sunradioj kaj freŝa aero fariĝas bela kaj forta; tion pravas la belaj grandaj fotoj.

Formato de la ĵurnalo estas 21 × 28,5 cm; ĝi enhavas 20 paĝojn kun dukolora bilda kovrilo kaj entute ĉ. 25 diversaj fotoj.

Abonprezo en Danlando, dan. kr. 10,00; en eksterlando kr. 12,00. La ĵurnalo ankaŭ povas esti sendata en fermita koverto, se oni deziras, por kr. 20,00. Abonpagon sendu al: ELDONEJO “SUNSPORTO” (Solsportforlaget), Amagertorv 3, København K., Danlando. Poŝtkonto N-ro 82064.

FIRMO CONTE RAG.

MICHELE SCHINAIA

Via Duca di Genova, 26

TARANTO (Italujo)

## EKSPORTOJ

de

komunaj, likvoraj, dolĉaj  
kaj tre renomitaj vinoj



Oni serĉas ekskluzivajn Koncesiistojn en  
ĉiuj landoj

Oni korespondas france, angle, germane,  
hispane kaj esperante



Kiu interesiĝas pri la afero skribu tuj al la  
nomita firmo

## REGULARO PRI LA SERVO DE INFORMPETO

**Fundamenta Principo :** Ĉiu membro rajtas uzi la servojn de la Delegitoj. La servoj mem estas senpagaj, sed la uzanto devas repagi la elspezojn de la Delegito.

**Oni rajtas peti informojn pri :** Komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj, ktp. Pri fakdemandoj oni skribu rekte al la faka Delegito, se tia ekzistas.

**Oni ne povas peti informojn pri :** Komerca pago-kapablo, morala indeco de persono (konfidencaj informoj). Tamen, tiukaze la Delegito rajtas interrilati kun loka agentejo, kiu sin okupas pri tio.

La Delegito rajtas rifuzi servojn, kies plenumon li juĝas kontraŭa al sia honoro aŭ konscienco.

**Plendoj :** Informpeto ne respondita de la Delegito normale dek tagojn post ĝia ricevo, rajtigas la petinton plendi ĉe la Centra Oficejo, kiu enketos. Oni ankaŭ plendu okaze de malbone farita servo.

**Atentu :** 1. Skribu tre legeble, precipe la adreson. Tiu-ĉi estu skribata ĉiam en nacia lingvo kaj per latinaj literoj.

2. Skribu sur la adresflankon post la nomo, la titolon Delegito de I.E.L., tiel, ke se la Delegito forestas, la letero estu transdonata al la Vicdelegito.

3. Aldonu post la subskribo la kuponon pri servopeto kaj ripetu sur ĉiu sendaĵo la plenan adreson. Stampo kun adreso estas rekomendata.

4. Aldonu al la informpeto respondkuponon (eĉ se ĝi estas presajaĵo).

5. Skribu ĉiam en Esperanto, la oficiala lingvo de I.E.L. La uzo de nacia lingvo nuligas la rajton al plendo.

6. Afranku sufiĉe la korespondajon.

7. Ne forgesu, ke la delegiteco estas honora ofico, kiun la Delegito akceptis por utili al Esperanto. Sekve faciligu lian taskon, ne ĝenante lin per petoj tute malgravaj.

Ĉi tiuj reguloj validas laŭsence ankaŭ por la rilatoj kun la Centra Oficejo de I.E.L.

**Dum Vojaĝo :** Ĉar la Delegito plej ofte ne disponas libere pri sia tempo, la membroj vojaĝantaj skribe informu la Delegiton pri sia vizito, almenaŭ 48 horojn antaŭe.

La Delegito havas la devon helpi la vojaĝanton. Sed oni memoru, ke ne estas la tasko de la Delegito atendi la fremdulojn en la stacidomoj, ilin akompani, fari komisionojn por ili, ktp.

## NOTOJ PRI LA ADRESARO DE LA DELEGITOJ

Tiu ĉi Adresaro estas ordigita ĝis la 28a de Februaro 1946. Por ĉiuj postaj ŝanĝoj aŭ korektoj de la Delegita Adresaro oni vidu la "Oficialan Informilon de I.E.L." en *Esperanto Internacia*.

La personoj pretaj preni sur sin la taskon de Delegito, Vicdelegito aŭ Fakdelegito, kie I.E.L. ankoraŭ ne estas reprezentata, bonvolu skribi al la Landa Ĉefdelegito aŭ Peranto, aŭ al la Centra Oficejo.

---

### MALLONGIGOJ

ĈD = Ĉefdelegito  
D = Delegito  
VD = Vicdelegito  
FD = Fakdelegito  
EO = Esperanto-oficejo

La steletoj \* \* \* antaŭ teksto indikas pagitan reklamon de entrepreno.

---

La Redakcio de la Jarlibro ne respondecas pri la tekstado de la sekvantaj detaloj, kopiitaj laŭ la informoj senditaj de la delegitoj.

## Ĉef-Delegitoj de I.E.L.

- Argentino .. Giordano Bruno Lopez, Amalia 347, Buenos Aires.
- Aŭstralio .. L. E. Pfahl, 64 Brighton Street, Croydon, N.S.W.
- Belgujo .. G. Van den Bossche, Oostenstr. 26, Antwerpen.
- Brazilo .. Antonio José Vaz, Rua Paraná 71, Rio de Janeiro.
- Danujo .. Christian Hougaard, St. Blichersvej 43, Aabyhøj.
- Egiptujo .. Tadros Megalli, P.B.450, Cairo.
- Finnlando .. Joel Vilkki, Somero.
- Francujo .. J. Guillaume, Esperanto-oficejo, 34 rue de Chabrol, Paris 10.
- Jugoslavnujo .. Ernest Kasović, Gradska ŝtedionica, Jelačićev trg. 10a, Zagreb.
- Maroko .. S-ino I. Fink, 5 Rue Savorgnan de Brazza, Casablanca.
- Nederlando .. Arie Pascha, Russenweg 4, Bergen (N.H.).
- Norvegujo .. Ragnv. Rian, Box 178, Trondheim.
- Nov-Zelando .. V. J. Leck, G.P.O. Box 330, Wellington, C.I.
- Palestino .. P. Lachowitzky, Kerem Quar, Jerusalem.
- Portugalujo .. J. de Saldanha Carreira, Av. Grão Vasco 33, r/c, Benfica-Lisboa.
- Svedujo .. Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32.
- Svisujo .. O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
- Usono .. Donald E. Parrish, 328 W. 46th St., Los Angeles 37, (California).



## Perantoj de I.E.L.

- Brazilo .. Brazila Ligo Esperantista, Praça da Republica 54-1º an, Rio de Janeiro.
- Britujo .. Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W.11.
- Bulgarujo .. Bulgara Esperantista Asocio, Str. Graf Ignatiev 2-II, Sofia.
- Ĉeĥoslovakujo Jaroslav Šustr., Benediktská 11, Praha I.
- Grekujo .. D-ro A. Stamatidis, Str. Rodou 23, Athinai 8.
- Hispanujo .. R. Gonzalez Cañadas, C. Gutenberg 8 pral., Madrid.
- Irlando .. Lorcan O'hUiginn, Sonas, Cnoc na hInneona, Dún Droma, Dublin.
- Islando .. Olafur S. Magnússon, Bergstadastraeti 30B, Reykjavik.
- Italujo .. Luigi Minnaia, Viale Giulio Cesare 223, Roma.
- Polujo .. Roman Sakowicz, Asnyka 4, Warszawa-Okecie.
- Urugvajo .. Pedro Casas, Mercedes 927, Montevideo.

## ACOROJ

**Capelas** (S. Miguel).

D : F-ino Marieta A. Serpa.

**Horta** (Faial—Açores). 7,000.

D : Domingos Garcia, apotekisto.

**Ponta Delgada** (S. Miguel—Açores). 20,000.

D : A. R. S. Rocha, Rua Margarida de Chaves 137

## ALGERIO

**Tlemcen** (Oran). 40,000.

D : F. Jelenc, profesoro, Rue Eugène Etienne, Maison Colin.

## ARGENTINO

*Ĉefdelegito* : Giordano Bruno Lopez, Amalia 347, Buenos Aires.

**Bahía Blanca** (Buenos Aires).

D : F. Prozoróvich, tornisto, Güemes 346. Tel : 0186.

**Buenos Aires**. 2,388,645.

D : G. B. Lopez, muzikinstruisto, Amalia 347. Tel : 64-3182.

VD : E. Iglesias Nuñez, ŝtatoficestro, Dehesa 1860. Tel : 70-6893.

FD (Fotografuro) : A. Barrot, fotografuristo, R. Escalada de San Martin 4334.

FD (Industria kemio ; Pra-Amerika Kulturo) : H. C. Otheguy, industria kemiisto, Boedo 1730. Tel : 61-4897.

FD (Katolikismo) : D-ro J. A. Quiña González, kuracisto, St. Uruguay 714.

FD (Kemio) : B. Crouzeilles, teknika oficisto, Martiniano Leguizamón 310. Tel : 64-3297.

FD (Komerco) : La VD.

FD (Libro-bindado) : J. Dobrik, bindisto, Rioja 1781, Dto. 8.

FD (Tekniko ; Scienco) : L. Musih, elektra inĝeniero, Pedro Goyena 38. Tel : 60-3829.

## ARGENTINO

\*\* *Quarello & Cia*, Eldonistoj, prezentas la verkon de Danial Quarello **Aprenda el Esperanto**; libro dediĉita al tiuj, kiuj deziras koni ĝisfunde, paroli korekte, kaj skribi perfekte la duan lingvon de ĉiu homo. Casilla de Correo 47 (Suc. 13), Buenos Aires.

**Comodoro Rivadavia** (Chubut). 10,000.

*D*: A. Gonzalez, petrolputisto, C. de Correos 49, Y.P.F.  
*FD* (Petrolputaj aferoj): La D.

**Córdoba**. 350,000.

*D*: J. Rodeiro, seruristo, Str. Mendoza 79.  
*VD*: J. Bayón, pentristo, Str. Humberto I, 747.  
Tel: 98053.

*FD* (Elektrotekniko): M. Espinosa, elektra inĝeniero, Belgrano 539. Tel: 6386.

*FD* (Fitoterapio): D-rino R. Scolnik, kuracisto, Str. Humberto I, 2160. Tel: 8347.

*FD* (Geologio): M. Roqué, studento, Calle Saavedra (Norte) 382.

*FD* (Natur-kuracado): D-ro J. Scolnik, kuracisto, Str. Humberto I, 2160. Tel: 8347.

**Esperanza** (Santa Fé). 18,000.

*D*: A. Schneider, Str. Castelli 1269.

**La Plata** (Buenos Aires). 200,000.

*D*: S. F. Querin, stenografisto, 17-1267, La Plata.

**Mar del Plata** (Buenos Aires). 150,000.

*D*: I. Antoñanzas, Sgo. del Estero 2376. Tel: 5471.  
*VD*: R. Herrero, tajloro, Castelli 3576.

**Necochea** (Buenos Aires). 24,000.

*D*: E. Balech, profesoro, Mitre 480.  
*FD* (Naturscienco; Instruado): La D.

**Perez Millan** (Buenos Aires). 2,000.

*D*: I. M. Rodriguez, kompostisto, Perez Millan, F.C.C.C.

**Porteña** (Córdoba). 3,000.

*D*: J. Taccone S, oficisto, Calle Sarmiento s/n., Porteña, F.C.C.A.

**Rosario** (Santa Fé). 500,000.

*D*: H. G. Calógero, universitata profesoro, Rodriguez 1615. Tel: 25481.

*VD*: A. F. A. Mántica, tradukisto, Str. Corrientes 439.  
*FD* (Instruado): W. M. Goodes, instruisto, Jujuy 1439, Depto. F. Tel: 21178.

*FD* (Komerco): P. Martin, komerc-vendisto, Suipacha 727. Tel: 93620.

## ARGENTINO. AŬSTRALIO

**San Francisco** (Córdoba). 28,000.

*D*: J. Matilla, komercisto, Str. Bartolomé Mitre 87.

**San Isidro** (Buenos Aires). 19,634.

*D*: D-ro M. H. Catalano, ĥemiisto, Olegario Andrade 113.

**Tartagal** (Salta). 7,000.

*D*: D-ro J. Miguel Reyes, farmaciisto.

**Tucumán** (Tucumán). 128,000.

*D*: F. Gonzalez, inĝeniero, Santa Fe 375.

**Venado Tuerto** (Santa Fé). 25,000.

*D*: E. Creus, farmaciisto, San Martin 200. Tel: 1100.

## AŬSTRALIO

*Ĉefdelegito*: L. E. Pfahl, 64 Brighton Street, Croydon, N.S.W.

**Adelaide** (South Australia). 230,000.

*D*: F-ino W. Addis, 25 Greville Avenue, Flinders Park.  
*VD*: R. N. Brown, tramveturigisto, 162 Wellington Road, Payneham, Adelaide.

*VD*: H. W. Buswell, tramveturigisto, 80 Alfred St., Parkside.

*FD* (Tramaferoj): E. L. Shelton, tramveturigisto, 33 Eighth Avenue, St. Peter's, Adelaide.

**Albury** (New South Wales). 15,000.

*D*: F. V. Taylor, instruisto, Technical College. Tel: 485.

**Avoca Beach** (New South Wales).

*D*: F. A. W. Thomas, bienposedanto, "Burramaronga", Avoca Beach, via Gosford, N.S.W.

**Bowen** (Queensland). 3,000.

*D*: M. McKay, ŝvendisto, Kennedy St.

**Brisbane** (Queensland). 350,000.

*D*: S. L. Parry, danc-muzikisto, 139 Stoneleigh St., Windsor, N.3.

**Bundaberg** (Queensland). 12,000.

*D*: S-ino J. W. Langtree, 3 Windermere St.

**Claremont** (Western Australia). 2,000.

*D*: S-ino H. E. Motteram, domestikisto, 10 Victoria Avenue.

## AŬSTRALIO

- Columboola** (Queensland).  
*D*: S-ino J. Freeman, dommastrino, Monreagh, Columboola, Western Line, Queensland.
- Goondiwindi** (Queensland). 3,400.  
*D*: S-ino H. Johansen, Police Station.
- Hakea** (Western Australia). 500.  
*D*: S-ino E. E. Sainsbury, domestrino, 4 State Mill.
- Hobart** (Tasmania). 62,000.  
*D*: Majoro J. Couche, instruisto, Anglesea Barracks.
- Kalbar** (Queensland). 800.  
*D*: E. Peck, terkulturisto, Box 5, Kalbar, Via Ipswich.
- Lithgow** (New South Wales). 13,430.  
*D*: J. H. King, 3 Evelyn Street, Corney Town, Lithgow, N.S.W.
- Melbourne** (Victoria). 1,100,000.  
*D*: R. R. Rawson, librovendisto, 169 Exhibition Street.  
*VD*: F-ino V. Cox, stenografistino, "Las Rosas," 31 Albany Crescent, Surrey Hills, E.10.  
*FD* (Presado): F. R. Banham, korektisto de presajoj ĵurnalaj, 2 Banchory Street, Essendon. Tel: FU 1064.
- Narrogin** (Western Australia). 3,000.  
*D*: W. L. Illingworth, kontoristo, 102 Federal St.
- Normanton** (Queensland).  
*D*: D-ro A. R. Maclurkin, kuracisto. Tel: 12.
- Parramatta** (New South Wales). 20,000.  
*D*: D-ro S. J. Woolnough, kuracisto, 111 Macquarie St. Tel: UW 9830.
- Perth** (Western Australia). 220,330.  
*D*: E. A. Walker, brikmasonisto, Box 391, G.P.O. (Portempe: 1 Eccleston Villas, Warfield Road, Bedfont, Middx., Anglujo).  
*VD*: N. V. D. Brodie, presisto, 43 McKenzie St., Wembley. Tel: W 1558.  
*VD*: H. Byatt, kontrolisto de konstruaĵoj, 10 McKenzie St., Wembley Park.  
*FD* (Instruado): F-ino O. Stempel, instruistino, 56 Selby St., Wembley Park. Tel: W 1178.  
*FD* (Kuracado): D-ro C. J. Caldera, kuracisto, 220 St. George's Terrace. Tel: B 7081; hejmo: MU 1580.

## AŬSTRALIO. BELGUJO

- Port Pirie** (South Australia). 12,500.  
*D*: H. G. Onn, kontrolisto de sulfurikacido-fabrikejo, 22 Vera Street.
- Queenstown** (Tasmania).  
*D*: C. C. Cowling, paroĥestro, The Rectory.
- Rockhampton** (Queensland). 35,000.  
*D*: W. V. Rymer, pastro, St. Luke's Vicarage, Rundle Street.
- Shepparton** (Victoria). 12,000.  
*D*: E. A. Turner, optikisto, 509 Wyndham Street. Tel: 290 kaj 127.
- Sydney** (New South Wales). 1,260,000.  
*D*: A. C. Boyle, leĝeja stenografisto, 340 Sailor Bay Road, Northbridge. Tel: XL1189.  
*VD*: W. R. Lamb, pensiulo, 92 Walker St., N. Sydney.  
*FD* (Arkitekturo): P. E. Schwerin, arkitekto, 1 Carabella Flats, McDougall St., Milsons Point.
- Townsville** (Queensland). 30,000.  
*D*: L. M. Glynn, fervojisto, 8 Harold Street, West End.
- Yetholme** (N.S.W.) 250.  
*D*: Thomas Porter, laboristo.

## BELGUJO

- Cefdelegito*: S-ro G. Van den Bossche, Oostenstr. 26, Antwerpen.
- Antwerpen**. 500,000.  
*D*: G. Vermandere, komercisto, Wetstraat 15.  
*VD*: A. Faes, Schoenmarkt 16-I.  
*VD*: M. Jaumotte, ĵurnalisto, 44 Avenue De Bruyn, Wilrijk-Antwerpen.
- Borcht Lombeek** (Brabant). 2,000.  
*D*: M. Blockerije, studento, Knoddelstr. 5.
- Brugge** (West-Vlaanderen)  
*D*: F-ino Y. Thooris, 17 Marché aux Herbes.  
*FD* (Instruado; Junularo): C. Braet, instruisto, Esscheboomstraat 1.

## BELGUJO

**Bruxelles-Brussel.** 870,000.

*D* : H. Castel, 434 Avenue de Jette, Ganshoren.

*FD* (Administrado) : E. Pierre, Rue Beckers 91, Bruxelles 4.

*FD* (Astrologio ; Filatelo) : R. Brihay, 44a rue de l'Orge, Ixelles, Bruxelles.

*FD* (Blinduloj) : S-ino F. Staes, 11 Avenue de la Liberté, Koekelberg-Bruxelles.

*FD* (Instruado) : F-ino A. Jennen, lernejestro, 72 Rue d'Albanie, St. Gilles-Bruxelles.

*FD* (Komerco) : Jos. Derks, entreprenisto, 226 Rue Rogier, Schaerbeck-Bruxelles.

*FD* (Konstruaĵoj) : R. Picquet, 132 Rue Berkendael, Ixelles, Bruxelles. Tel : 43.23.86.

*FD* (Kuracistaj aferoj) : D-ro R. Maes-Dubois, kuracisto, Rue du Noyer 282, Bruxelles 3.

*FD* (Radio kaj Inĝenieraj aferoj) : R. Couppez, 35 rue Auguste Danse, Uccle. Tel : 44.45.18.

*FD* (Teknika instruado) : J. Alofs, Avenue de la Villégiature 16, Woluwe St. Lambert, Bruxelles.

**Charleroi** (Hainault). 30,000.

*D* : V. Demoulin, telegrafisto, 40 Rue Bayet.

**Gent** (Oost-Vlaanderen). 250,000.

*FD* (Instruado) : F-ino J. Nachtergaele, instruistino, Puinstraat 56.

*FD* (Plastikaj artoj) : A. De Martelaere-Bentos, skulptisto, Provenierstersstraat 25.

*FD* (Sciencoj ; faka literaturo) : C. Vandevelde, inĝeniero, Peter Benoîtlaan 230, Gent-Merelbeke.

*FD* (Turismo) : S-ino M. De Rijcke, Martelaarslaan 26.

*FD* (Urbaj aferoj ; Komerco) : F. De Man, urba oficejestro, Filips van Cleeflaan 131.

**Huy** (Liège). 14,000.

*D* : A. Landenne, kalkulisto, Rue des Brasseurs 2.

**La Louvière** (Hainault). 25,000.

*D* : A. Tassin, industriisto, Rue St. Joseph 1.

*VD* : E. Jacques, Rue A. Warocque 122.

**Liège** (Liège). 180,000.

*D* : L. Magotteaux, inĝeniero, 141 Rue des Vennes.

**Mechelen a/M.** (Limburg). 4,500.

*FD* (Katolikismo ; Turismo) : A. J. Beckers, pastro-profesoro, Instruista Instituto. Tel : 16.

## BELGUJO

**Nieuwpoort** (West-Vlaanderen). 5,000.

